Protokolo de la estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo
lundon la 25-an de aŭgusto 2025 per Zoom

**Ĉeestis** Bård Hekland, Jardar E. Abrahamsen, Lars Sandbakk, Harald Rygg kaj Marianne Lund.

**1. Aprobo de la tagordo**
La tagordo aprobiĝis.

**2. Trarigardo de la protokolo de la pasinta estrara kunveno la 21-an de majo 2025**
La protokolo de la pasinta estrara kunveno (okazinta antaŭ la jarkunveno de NEL, do de la malnova estaro) jam aprobiĝis poŝte.

**3. Landa kunveno la 5-an de junio**
Pro «teknika» eraro la protokolo de la landa kunveno ankoraŭ ne estas subskribita.
Estas malklare, ĉu la nomumo de komitatano al komitato de UEA funkciis bone.

**4. Estrara disdivido de taskoj**
La plimulto de la estraranoj estis reelektitaj, kaj la disdivido de taskoj grandparte estos tia, kia en la estraro de la pasinta periodo. En posta estrarkunveno ni pludiskutu, kiel organizi la laboron pri aperigo de novaj tekstoj en la retpaĝo.

**5. Esperantonia**
Bård, Claude kaj Marianne intense ordigis la ejon de la 2-a ĝis la 6-a de julio. Rezulte de ilia laboro la ejo nun estas pura, orda kaj belaspekta.
En la supra oficejo estas du liberaj laborlokoj prete disponeblaj.
Herman Ranes kopiis, konservante por la estonteco, la tutan enhavon de la malnova oficeja komputilo, kiu ne plu estos uzata.
Krom Herman partatempe aŭ vizite ĉeestis ankaŭ pluraj klubanoj de Oslo.
La supran oficejon lavis profesia lavfirmao.
Ni repagos vojaĝkostojn al tiuj du ordigantoj, kiuj venis al Oslo nur tiucele. La ordigado kaŭzis ankaŭ kelkajn aliajn elspezojn, interalie por profesia lavado kaj rubejaj servoj.
Nia propono pri lukontrakto estas pretigita kaj akceptita de la verkistinoj (luantinoj).

**6. Petoj al Legaco Uhlen**
La estraro decidis peti jenan apogon de Legaco Uhlen:

- 7 000 kronojn por kursaj anoncoj en 2024 kaj 2025
- 25 600 kronojn por aldonaj kostoj rilate al Norvega Esperantisto en 2024 kaj 2025
- 2 600 kronojn por Operasjon Dagsverk 2024
- 27 000 kronojn por purigo kaj renovigo de Esperantonia

**7. Kunlaboro kun la sveda federacio**
Depende de niaj laborfortoj kaj konkretaj ideoj ni konsideros pli aktivan kunlaboron kun la sveda (kaj aliaj nordiaj) E-organizaĵoj pri eldonaĵoj (ekzemple revuo), kursoj, librokolektoj kaj aliaj temoj.

**8. Evantualaĵoj**
Neniu.

**9. Venonta estrara interkonsiliĝo**
La venonta estrara interkonsiliĝo okazos la 1-an de oktobro je 20.30.

Protokolis Marianne Lund